

Prezo: 6 €

www.satesperanto.org

Januaro-Februaro 2021 | n-ro 01-02 (1387-1388)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

PERANTOJ

Aŭstralio – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au

Belgio – Claude Gladly
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22

Bosnio-Hercegovino – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094

Brazilo – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete: esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa): +557 7988011780

Britio – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62

Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk

Bulgario – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSP

Ĉeĥio – Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel.: +420.737230231, rete: stiburekv@seznam.cz
IBAN: CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX

Ĉinio – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970

Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio

Francio – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr

Germanio – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

Hispanio – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM

Hungario – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. 1/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com

Italio – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio
rete: carlo.bourlot@gmail.com
Tel.: +39 011 39 70 477; Poŝtel.: +39 333 34 89 280

Poŝtkonto: n-ro 43976158
IBAN: IT8820760101000000043976158
BIC: BPPIIRRRXXX

Izraelio – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net

Japanio – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon

Katalunlingvio – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat

Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paz23@gmail.com

Kroatio – Ivica Šćepanović (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
tel.: +385.21.647.059, Poŝtel.: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st-com.hr

Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X

Litovio – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457

rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank

Malagasio – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it

IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG

Norvegio – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no

Portugaliao – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1^a
PT- 4000-309 PORTO

retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com

Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos

Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

Por **Francio, Germanio, Hungario kaj Norvegio**,
pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn
en "Ĉiuj landoj") sed nepre informu la peranton
kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.

> **Nura abono al Sennaciulo: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapero, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

Rusio – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru

Serbio – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG

Svedio – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS

Svisio – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete: rischneller@gmail.com

Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio

rete: andreespero@gmail.com
telefon: 380 67 99 470 03
Usono – Brandon SOWERS

PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com

Ĉiuj landoj – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Sennaciulo
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
Retadreso: kontakto@satesperanto.org
Retejo: http://satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto:
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Vic-prezidanto: Pedro Sanz
Sekretario: Diana Riŝar
Kasisto: Bruno Henry
Rete-kasisto kaj eldonestro: Guy Cavalier
Ceteraj membroj: Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone

Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato: Paz kaj Dieter Rooke

Sennaciulo

Redaktoskipo kunordiganto: Vinko Markovo
Vic-kunordiganto: Pedro Sanz
Enpaŝiganto: Nicolas Raymond

Ceteraj redaktantoj: José Antonio del Barrio, Riccardo Lamperti, Masako Tahira (Masakato), Gary Mickle, Rob Moerbeek, Gražina Opulskienė, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale

Kontribuoj sendu elektronike al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio

Pri financaj aferoj sendu al:
financoj@satesperanto.org

Libromendojn sendu al:
libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al:
pimskrab@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondacas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par/Presita de:
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/jara abono:
France 36 €

Autres pays/aliaj landoj: petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

KOTIZOJ 2021

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	8 €	Kongo, DR	4 €
Aŭstralio	48 €	Koreio	36 €
Aŭstrio	48 €	Kroatio	16 €
Barato	4 €	Kubo	4 €
Belgio	48 €	Latvio	12 €
Bosnio-Herc.	8 €	Litovio	12 €
Brazilo	16 €	Luksemburgio	48 €
Britio	48 €	Madagaskaro	4 €
Bulgario	8 €	Makedonio	8 €
Ĉeĥio	24 €	Malio	4 €
Ĉinio	8 €	Meksiko	12 €
Danio	48 €	Mongolio	4 €
Estonio	16 €	Nederlando	48 €
Finnlando	48 €	Nepalo	4 €
Francio	48 €	Norvegio	48 €
Germanio	48 €	Pollando	16 €
Grekio	8 €	Portugaliao	24 €
Haitio	4 €	Rumanio	12 €
Hispanio	36 €	Rusio	12 €
Hungario	16 €	Serbio	8 €
Irano	8 €	Slovakio	16 €
Irlando	48 €	Slovenio	16 €
Islando	36 €	Svedio	48 €
Israelo	36 €	Svisio	48 €
Italio	44 €	Tajvano	32 €
Japanio	48 €	Turkio	12 €
Kanado	48 €	Ukrainio	4 €
Kolombio	8 €	Usono	48 €

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

Karaj legantoj,

En 1921, la januara numero de la gazeto *Esperantista Laboristo* enhavis noton, kiu unuafoje menciis la nomon SAT kiel tiun de asocio fondota en tuj posta aŭgusto, dum kongreso en Prago. Memorigante pri tio, la verkintoj de la unua volumo de la *Historio de SAT (1921-53)* notis, ke tiu nomo transvivos jardekojn. Nun ni povas fiere konstati, ke ĝi jam atingis preskaŭ jarcenton! Tamen, la alveno al tiu ĉi jubilea jaro havas amaran guston. Ja ni kovrilpaĝe estas devigitaj omaĝi al kamarado Vivancos, kiu siavice fariĝis viktimo de la pandemia situacio. Li mortis, sed lia idealo pluvivas, interalie per artikolo lia ĉi-numere publikigita.

La daŭranta pandemia situacio vekas dubojn pri la espero ĉeeste kunveni en Bjalistoko inter la 25a de julio kaj la 1a de aŭgusto 2021. Tial estas preparata nova reta aliĝilo, kiu ebligas senpagan aliĝon kaj proponadon de program-kontribuoj, kun indiko pri la intencoj eventuale partopreni ĉeeston eventon. La politeknika universitato, kie komence estis antaŭvidite, ke la kongreso okazos, ne akceptas mendojn nuntempe, sed la OKK ankoraŭ esploras pri la eblo organizi pli modestskalan eventon en urbocentra lernejo.

Intertempe, la kolumnoj de *Sennaciulo* restas malfermaj por ebligi ide-interŝanĝojn inter ĉiuj legantoj. Ĉi-numere ili denove estas sufiĉe viglaj kaj variaj. Por pli rektaj kaj tujaj interŝanĝoj, kiuj cetere povas konsistigi deirpunkton por kontribuoj en *Sennaciulo*, estas je via dispono diversaj elektronikaj komunikiloj, prezentitaj sur la paĝo 51.

Fine, ne forgesu uzi vian balotilon antaŭ la 28a de februaro por elekti viajn plej ŝatatajn kandidatojn por la PK kaj Ĝenerala Konsilantaro.

Agrablan legadon kaj kontribu-riĉan jubilean jaron deziras al vi

La redaktoskipo

Frontpaĝa bildo:

Eduardo Vivancos
1920 - 2020

Enhavo

Enhavo

Nekrologo

4 Pri la lastaj jaroj de Eduardo Vivancos

Historio

7 Olimpiaj Ludoj en Barcelono

9 Pri la nacia fiero de la grandrusoj

12 Imperiismo kaj la socialista maldekstrularo tempe de la nova malvarma milito

Tra la mondo: Ameriko

16 Atako al la Kapitolo

Tra la mondo : Ameriko

17 Strato por la memoro

Tra la mondo: Azio

17 Honkongo, konstruu aŭtonomian urbon de laboristoj kaj civitanoj!

21 La Nova Silka Vojo kaj la vartraĵoj Ĉinio-Eŭropo

23 Ĉu la Tokio-Olimpikoj povos okazi?

Tra la mondo: Mezoriento

26 "Mi hontas, ke mi ne konsciis pri frue pli la situacio"

27 "Öcalan serĉas de 27 jaroj pacan solvon"

Tra la mondo: Eŭropo

29 En Belorusujo la urbaj junuloj premas por ŝanĝo

32 Pri Belorusio

33 Kosovo - speciala kazo

35 Albanujo, drivanta "bona lernanto"

40 Kongreso de la Portugala Komunista Partio

Medio

41 Evoluado de la mondloĝantaro

Intelekta memdefendo

43 Nova erao de civilizacio

44 Ĉu faktoj ankoraŭ gravas?

45 Certajo kaj leĝo kiel "amen" en preĝo!

48 Patrin' mia 'stis cigaredist'

48 La ekstremdekstro, deziranta disvastiĝi kun la viruso

Nekrologo

49 Antonio Marco Botella (1921-2020)

50 Manuel López Hernández (33167)

SAT-anoj aktivas

51 Ne nur retleteroj en diskutlisto

Beletro

52 Hispana somero

55 Alia vojo

Pri la lastaj jaroj de Eduardo Vivancos

Mi iom sciis pri la vivitinero de Eduardo Vivancos (1920-2020), ĉar mi verkis centon da biografietoj pri esperantistoj por la katalunlingva Vikipedio, interalie tiun lian. Temas pri barcelonano, kiu travivis la plej dramajn eventojn de la dudeka jarcento. Juna idealisto, li batalis kontraŭ faŝismo kaj suferis ekziliĝon kaj koncentrejojn. Por la homoj de mia generacio, temas pri mitaj okazaĵoj. Poste li ĉefrolis en la internacia liberecana movado. Krome, li estis atleto, kiu preparis sin por la popolaj Olimpiaj ludoj de Barcelono en 1936, kiam okazis la militista puĉo. Ĉar ankaŭ mi (amatore) maratonas, jen alia elemento, kiu kunligis nin.

En printempo 2017, mi konatiĝis kun li en Toronto. Li aĝis 96 jarojn. Li loĝis en maljunuleja hejmo, estis bone flegata kaj pasigis multe da tempo kun sia filo Floreal. Li pli amikiĝis kun flegistoj kaj doktoroj ol kun la homoj samaĝaj kiel li. Malsame kiel ĉe la aliaj veteranoj, lia

menso bone funkciis, kaj li ŝatis montri sian spritan humuron. Lia ĉefa sanproblemo estis la vidkapablo, kiu devigis lin ne plu kuri jam de dudek jaroj. Spite al ĉio, mi trovis lin profunde optimisma.

Li atendadis min. Plurajn monatojn li antaŭguis niajn konversaciojn cele al verkado de eventuala biografio lia, kaj li igis labori sian cerbon por organizi ĉion, kion li ŝatus rakonti. Kaj tie mi estis. Dum semajno mi vizitis lin ĉiutage. Laŭ interkonsento, temis pri duhoraj babiladoj matenmeze, ĉiam en Esperanto. Li kutimis bonvenigi min kun rideto: “Pri kio vi demandas min hodiaŭ?” Liaj okuloj brilis. Pacience li respondis ĉiujn miajn dubojn. Tio postulis grandan strebon, ĉar mi ofte miksis temojn kaj epokojn. Li ankaŭ petis novaĵojn pri malnovaj kamaradoj kaj pri nuntempaj okazaĵoj.

Eduardo bonŝancis pro tio, ke pluraj amikoj regule vizitis lin. Carlos García,

prezidinto de la hispana-kanada asocio por demokratio, klarigis al mi, ke, dum la Franco-diktaturo, la familio Vivancos plej aktivis en tiu asocio. Vizitis lin ankaŭ kelkaj anoj de la klubo por veteranaj atletoj, kiun li kunfondis en 1964. Kaj malmultaj esperantistoj, interalie la karmemora Mateo Chisholm, kiu peris mian kontakton kun Eduardo kaj Floreal. Krome, Eduardo babiladis telefone kun sia fratino Juliette, eble la homo, al kiu li sentis sin plej ligata.

Ekde la forpaso de (la patrino kaj, respektive, edzino) Ramona en 2015, la rilato inter Floreal kaj Eduardo iĝis pli intima. Ili ofte kuneliris por senti la aeron, la sunon, la vivon. Iom post iom la patro rakontis al la filo nekonatajn detalojn de sia vivo. Terurajn memoraĵojn pri milito kaj koncentrejoj, sed ankaŭ belajn momentojn pri espero kaj amo. Floreal elkore admiris sian patron kaj kareseme zorgis pri li. Eventuale li eĉ loĝis en apuda maljunuleja ĉambro kaj nur semajnfine iris hejmen. Ne oftas tia granda fila amo.

Post mia reveno en Eŭropon, mi daŭrigis la konversaciojn telefone. Tre emocie estis laŭtlegi al Eduardo malnovan leteron aŭ artikolon kaj aŭskulti, kiel tio spronis liajn memoraĵojn. Li ĉiam scivolis pri la lokaj novaĵoj kaj afable demandis ankaŭ pri mia parulino. Foje ankaŭ ŝi salutis lin. Dume li ricevis neatenditajn omaĝojn, kiel la publikigon de lia dummilita taglibro, kaj en Esperanto (en *Beletra Almanako*) kaj en la hispana (en *Humanitat Nova*).

Fine de 2018, la ekscio pri venonta SAT-kongreso en lia naskiĝurbo ekscitis lin. Kiom li ŝatintus partopreni ĝin! Li daŭre volis esti informita pri la organizado kaj donis konsilojn el sia propra sperto. Eble ne estas koincido



Centjariĝa festo de Eduardo ĉe la maljunuleja hejmo (Toronto, septembro 2020)



Centjariĝa festo de Eduardo ĉe la maljunuleja hejmo (Toronto, septembro 2020)

lia tiama decido mondonaci al lia estimata SAT. Floreal forte subtenis tion: “Temas pri lia mono, kaj li devas uzi ĝin por tio, kion li plej amas”.

Dum la inaŭguro de tiu kongreso, Juliette surprizis la ĉeestantojn per jenaj vortoj, laŭte diritaj per forta kaj klara voĉo: “Vi povas rimarki, ke mi ne havas tekston, pro la fakto, ke mi ne havas bonajn okulojn. Mi ne povas legi, do tion, kion mi diros al vi, mi tutsimple enkapigis. Kaj tio estas la vortoj de mia

frato Eduardo Vivancos, kiu deziris saluti ĉi tiun kongreson. Jen kion Eduardo diras, estas liaj vortoj”:

Mi deziras saluti la partoprenantojn de tiu 92-a SAT-kongreso de Barcelono. Ĝuste en Barcelono mi lernis Esperanton kaj tio okazis en la jaro 1936, fine de tiu jaro kaj ene de la hispana civila milito. Ekde tiam Esperanto fariĝis por mi ege ĝrava, ĉar tio estis eltrovo. Esperanto estis ligita al la tiamaj ideoj, al la homecaj movadoj kaj al revolucioj, kia mi estis kiel

junulo. Esperanto restis en mia vivo kiel io tre ĝrava. Tuj poste, kiam eblis, mi aliĝis al SAT, kaj tio estis en la jaro 1945, tuj post la fino de la dua mondmilito. En SAT mi trovis la etoson kiun mi deziris. Tio estas, kamaradeca, homeca, tolerema. Mi aliĝis tiam kaj ankoraŭ nun mi estas SAT-membro. Jam de 74 jaroj mi estas en SAT, sed ne ĉiam aktiva. Mi aktivis, kiam la fizikaj fortoj permesis tion al mi. Nun, kompreneble, mi ne povas. Kaj hodiaŭ SAT kongresas en Barcelono. Imagu, kiom mi ŝatus partopreni tiun kongreson! Tiu estus vera revo por mi, sed fizike mi ne havas la kapablon. Mi ne plu povas. Sed mense, laŭ la penso, mi troviĝas hodiaŭ inter vi, kun vi ĉiuj, al kiuj mi deziras memevidente fruktodonan kongreson kaj ĉefe agrablajn tagojn en Barcelono, en la kadro de, mi ne dubas, plensukcesa SAT-kongreso. Saluton al ĉiuj kaj Antaŭen!

Danke al la helpo de Floreal, dum la kongreso ni pretigis komputilan babiladon kun Eduardo, kiun partoprenis dekoj da homoj, interalie Juliette kaj Sylvie Ternant. Laŭ asertoj de pluraj kongresanoj, temis pri la plej kortuŝa programero. Tamen estis detalo, pri kiu tiam neniu sciis. Lia sanstato malpliboniĝadis laŭe al lia aĝo. Li plurfoje falis



Eduardo staras apud siaj gepatroj kaj fratino (Barcelono, 1937)



Eduardo kaj Ramona (Parizo, 1940-aj jaroj)



Protesto kontraŭ la Franco-diktaturo fare de Hispana-Kanada Asocio por Demokratio - Eduardo tenas la porteblan afiŝon (Toronto, 1960-aj jaroj)

surteren, sed malpermesis al Floreal ion diri pri liaj doloroj tiurilate. Li ne volis, ke tio influu la ĝuindan etoson en Barcelono. Kaj li afable rakontis aventurojn kaj dialogis kun la ĉeestantoj dum duonhoru, multe pli longe ol kutime daŭris liaj tiamaj konversacioj.

Jen anekdoto, kiu evidentigas lian humilan kaj homecan karakteron. Kaj kiu memorigas aliajn, kiel estas la fojoj, kiam li volontulis dum la milito por donaci sangon [tiam tio okazis rekte de brako al brako], tiel helpante savi la vivon de vunditoj pro la italaj bombadoj en Barcelono. Aŭ tiam, kiam, jam en Toronto, li kaj Ramona decidis loĝigi en sia hejmo Pedrito-n, filon de hispana boksisto, kiu, sekve de la vundoj ricevita en bokso-matĉo, ne kapablis prizorgi

sian familion.

Kelkajn monatojn post la barcelona kongreso, alvenis la kronviro pandemio, kio por Eduardo signifis la komencon de la fino. Trudizoliĝo okazis en Kanado same kiel en multaj aliaj landoj. Dum multaj monatoj, li ne plu rajtis ricevi vizitojn. En tiaj kondiĉoj, lia sanstato suferadis, kaj li pli rapide kadukiĝis. Kvankam li ne plendis, li laciĝis ĉiam plu, kaj liaj telefonaj konversacioj estis ĉiam pli mallongaj.

Kiam la virusa situacio ŝajne plibonigiĝis, oni denove permesis la vizitojn de Floreal. Ili kunaŭskultadis poezion. Eduardo aparte ŝategis la *Piratan kanton* de la hispana romantika poeto José de Espronceda. Li daŭre petis aŭskulti ĝin: “Denove, Floreal!” Kaj Floreal obeis,

kontenta pro la ĝojo de la patro. Ili kunaŭskultadis ankaŭ revoluciajn kantojn, kiel *Ek al Barikadoj!* kaj *Idoj de l' popolo*, kiuj altigis la spiritforton de Eduardo. Kaj francajn kantistojn, kiel Edith Piaf kaj Maurice Chevalier, ĉefe ties kanton *À Barcelone*. Ĉiam Barcelono. Tiel, pere de muziko kaj poezio, Eduardo memoradis

sian vivon.

Dume Floreal lernadis el lia patro. “Dek kvarjaraĝa li diris: ‘Mi kuros maratonojn’. Oni mokis lin, sed, kiam li estis kvardekjara, li tion faris”, dolĉe rakontas Floreal. “Li sekvis sian propran vojon, siamaniere, sen halti. Tio tenis lin vivanta”. Floreal pravus. Fakte, Eduardo supervivis ĉiujn siajn kamaradojn. La pasintan 19-an de septembro 2020, li atingis sian lastan revon: centjariĝon. Estis bela tago. Kortuŝe omaĝis lin la flegistoj, kaj Eduardo kontentis.

La semajno antaŭ la 30-a de decembro pasis tre rapide. Malvarmumo iĝis pneŭmonio, poste aldoniĝis KOVIM-19, kaj Eduardo ekbezonis oksigenon. Sentante, ke alproksimiĝas la fino, li petis telefonalkvokon al la fratino. Iom poste, kiel multaj aliaj en la pandemia periodo, li forpasis sola, izolita. Jen dramo de la nuna epoko.

Dum pli ol cent jaroj Eduardo faris sian propran vojon. Libera kaj libere, kiel bele esprimas la poemon de Espronceda, en traduko de la esperanta tradukisto Fernando de Diego [*]:

Kun la flankoj dek-kanonaj,
favor-vente, pufa-vele,
sur la maro glitas bele
tre rapida brigantin’.
(...)
Ĉar mia leĝo: la forto.
Ĉar mia kara: la ŝip.
Mia patrujo: la maro.
Kaj la liber’: mia Di’.

Bonan vojaĝon, kara Eduardo, la tero estu al ci malpeza!

XAVI ALCALDE

Noto:

[*] La tuta poemo legeblas en Fernando de Diego, *Sentempa simfonio*, 1987; Miguel Fernández, *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, 2013, p. 49-53; kaj *Beletra Almanako* 40, 2021. Vidu ankaŭ la retejon de Fátima el Arundo: <http://eofajma.blogspot.com/2014/10/klasikajo-1-la-pirata-kanto-de.html>



Eduardo staras apud siaj gepatroj, edzino kaj gefiloj (Toronto, 1959)